

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2014:1

## Siberia romanco

*Sur blinda voj'  
de l' neĝa kamp',  
kie vagadas lupoj,...  
kun kormalĝoj',  
per pena ramp'  
marŝas mizera trupo...*

*La vestojn ŝiras frosta vent'...  
La korojn tordas larma sent'...  
Super la kapoj korvoj krias...  
la korvoj krias.*

*Jen sonoril'  
el fora spac'  
rompas la mutan horon.  
La tinta tril'  
pri dolĉa pac'  
vekas en kor' memoron.*

*Kaj unu pensas pri l' kaban',  
en hejma lando pri infan',  
kiu la patron vokas vane...  
nur vokas vane...*

*Susura son'  
de l' vaga vent'  
lule logante bruas...  
Al voja ŝton'  
nur por moment'  
li pro mortlac' genuas...*

*Alspiras sonĝojn vintra reĝ'  
kaj kovras lin per blanka neĝ'...  
Kanton funebran korvoj krias...  
la korvoj krias.*

(Berezovka)

Julio Baghy  
El la poemaro PRETER LA VIVO



## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2014 • 102-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

sveda@esperanto.se

**E-post till redaktionen:** laespero@esperanto.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress, Råå

**Prenumeration 2014:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Besöksadress:** Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**E-post:** sveda@esperanto.se

**Nätsida:** www.esperanto.se

**Öppettider:** Esperanto-Centro har begränsade  
öppettider. Ring i förväg!

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123

**Medlemsavgift 2014:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tillägsexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona

**E-post:** eldona@telia.com

**Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** <http://www.esperantosverige.se/eg-om-oss>

**E-post:** egarden@esperanto.se

**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

**sänds till** Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperanto.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5-6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## LA ESTRARO INFORMAS

I förra numret av La Espero kunde ni läsa om förändringar som är på gång inom SEF, bl a att vi beslutat att säga upp lokalen på Vikingagatan i Stockholm. Vi behövde emellertid inte säga upp hyreskontraktet för EC utan kontraktet löper tre år till. Orsaken är att vi har fått medhyresgäster under dessa tre år och har på detta sätt fått en respit. Avsikten är dock fortfarande att säga upp/överlåta lokalen, eftersom vi anser att våra knappa resurser bör användas till något som förhoppningsvis kommer alla våra medlemmar till del och inte till att hålla en lokal som utnyttjas så pass lite. Av denna anledning har vi skaffat en box-adress som gör oss oberoende av var eventuell lokal ligger. Vår nya adress är Svenska Esperantoförbundet, Box 2276, 103 17 Stockholm. Det kommer att gå att skicka post till Vikingagatan ett tag till, men vi har eftersändning till boxen, så övergå till den adressen istället. Några av våra medlemmar har sagt sig beredda att bidra till finansieringen av lokalen under de tre kommande åren och vi har på förslag att bilda en "Rondo EC".

Vill du också vara med?

Kontakta då oss på [sveda@esperantoforbundet.se](mailto:sveda@esperantoforbundet.se) eller telefon 0736-170123. (Ann-Louise).

Som du kanske har sett kommer den svenska kongressen 1-4 maj i Lesjöfors till stor del att handla om vår verksamhet och esperantorörelsens framtid i Sverige. Temat är "Framtiden" med underrubriken "Vad håller vi på med – vart är vi på väg?".

Förutom att vi ordnar en s k "verkstad" på detta tema så har vi inbjudit en representant från UEA-styrelsen för att tala om dess nya strategi, speciellt inom området kompetensutveckling för aktiva medlemmar. Detta arbete stämmer väl överens med temat för vår kongress.

När informationen att den historiska rock-gruppen AMPLIFIKI skulle återförenas på scenen i samband med IJF 2014 i Italien, beslöt vi genast att inbjuda dem till vår kongress – och de accepterade! Missa inte chansen att höra dem igen, efter så många år.

Anmäl dig gör du enkelt genom SvEspKon i EsperantoSverige. Om du inte har tillgång till dator kan du kontakta oss för anmälan. Ring Anita på 054-83 08 87.

Välkommen!

## Iom pri la programo dum la kongreso.

La temo de la sveda kongreso 1 – 4 majo 2014 estas "La estonto" Lkun la subtitolo "Kion ni faras - kien ni iros?".

Ni invitis reprezentanton de la UEA-estraro por paroli pri ĝia nova strategio, precipe sur la kampo Aktivula Maturigo, kie ili proponas seminariojn kunlabore kun la Landaj Asocioj. Tiu laboro bone kongruas kun la temo por nia kongreso.

Kiam nin atingis la informon ke AMPLIFIKI, historia esperanta rok-grupo, rekuniĝos surscenejen okaze de la IJF 2014 de Castelsardo (Italujo) ni tuj decidis inviti ilin al nia kongreso – kaj ili akceptis! Ne maltrafu la ŝancon aŭdi ilin denove, post tiom da jaroj.

Vi facile povas aliĝi tra SvEspKon en la retejo EsperantoSverige. [[esperantosverige.se](http://esperantosverige.se)]

Bonvenon!

Du kommer väl ihåg att din medlemsavgift för 2014 måste ha kommit in på SEF:s konto 2012-3 senast en månad före årsmötet för att du ska ha rösträtt på förbundets årsmöte. I år innebär det den 31 mars.

## Inför kongressens verkstad om “Vad håller vi på med – vart är vi på väg?”

... vill jag skänka lite ljus åt vad styrelsen hittills har hunnit med. Det är inte en verksamhetsberättelse i egentlig mening, utan en översiktlig reflektion utifrån mitt perspektiv.

Det har hänt en hel del under det första halvåret och än har vi inte riktigt funnit formerna, men vi är på rätt väg. Medlemstalen har rasat från ca 2000 år 1980 till knappa 300 idag, ändå har vi kvar den gamla kostymen. Trenden fortsätter nedåt. Kan SEF överleva detta? Jag tror inte det. Kan vi göra något? Ja!

En väg är att lämna det hierarkiska tänkandet och börja jobba mer så som den nya vågens ideella verksamheter fungerar världen över – platt. Verkstaden är ett sätt att få svar på många frågor som hänger över oss, och vi hoppas verkligen att många intresserar sig för att delta och bidra med sitt perspektiv. Anmäl dig till kongressen!

Esperanto-Centro har diskuterats i åtskilliga år. Redan för tio år sen konstaterades det att det var dags att “göra något”, men tanken föll i glömska. Efter mycket prat landade till sist insikten att det är bättre att sätta stopp nu än senare. Då kom en temporär räddning genom hyresgäster för de kommande tre åren. Det innebär fortfarande nedläggning, men den kan ske under lugnare former.

Brytpunkten för att driva E-C, ge ut La Espero samt ha råd med broschyrer och information ligger på ca 500 medlemmar. Om trenden håller i sig är vi nog inte fler än 150-200 stycken om tre år.

Styrelsens inre arbete har förändrats en hel del. Mycket sker genom Diskutejo på hemsidan EsperantoSverige. I detta

diskussionsforum har vi tre delar – en helt öppen, en för SEF-medlemmar och en dold del bara för styrelsen. Man måste ha konto på EsperantoSverige och logga in för att följa och delta i debatten. Forumformen tillåter snabba puckar och lättare åtkomst av information.

En annan aspekt av styrelsearbetet är “syftet”. Vad är det egentligen styrelsen jobbar med? När jag ställde frågan blev svaret omedelbart “sprida esperanto”. Är det verkligen det? frågade jag tillbaka och möttes av stora ögon. Att SEFs uppgift är att sprida språket har jag inget att invända emot, men är det verkligen även uppgiften för själva styrelsen?

Jag ställde frågan när vi satt samlade runt ett bord med ritade koncentriska cirklar – en *OLSON-cirkel*\*. Efter en stunds djuplodande diskussioner och intressanta funderingar kom styrelsen fram till att syftet för styrelsen är att se till att alla samarbetar så att vi tillsammans når målet “sprida esperanto”. Det var ett helt nytt perspektiv som gav andra svar än tidigare. Arbetet delades in i fyra “Fokusområden”:

- Stärka medlemmarna,
- Information,
- Förvaltning och
- Kongress.

Det finns massor med intressanta saker utanför dessa fokus, men med de begränsade resurser styrelsen har måste vi “hålla ögonen på bollen”.

La Espero är det enda som enligt stadgarna ska ingå i medlemsavgiften. Det står också uttryckligen att tidningen är organ för SEF. Under en rundringning till ca 15 personer under sommaren förstod jag dock att tidningen inte ansågs som särskilt viktig. Många kände att avsändaren var luddig och tyckte

till och med att bladet helt kunde läggas ner. Jag tog upp det och i ljuset av fokuset kom vi fram till att styrelsen måste vara mycket tydligare och synas. “Styrelserutan” var därmed född. Efter andra numret med styrelseruta blev jag kontaktad av en av de mer högröstade förespråkarna för nedläggning, som nu tyckte att tidningen blivit riktigt bra. Det går inte att göra statistik på en enda mätpunkt, men jag hoppas det tyder på att La Espero har fått en tydligare och efterfrågad funktion.

Den sista stora förändringen handlar om hemsidan esperanto.se. Den gamla ligger i skrivande stund fortfarande kvar, men är på väg att bytas ut mot två olika: *esperanto.se* som i första hand vänder sig till utomstående och *esperantoforbundet.se* för förbundet.

Tanken är att den som redan kan esperanto inte behöver informeras om grundläggande ting, och att den som är nyfiken inte ska drunkna i interna detaljer om verksamheten. Även om de flesta av våra medlemmar inte tillhör internetgenerationen, så gör vår främsta målgrupp det. Därför måste vi anpassa oss och finnas där information söks. Ytligt nyfikna måste hitta något av intresse inom 10 sekunder på en hemsida, annars surfar de vidare.

\* OLSON är en förkortning av Organiskt Ledningssystem för: Själv-Organiserande Nätverk och är en modell/metod för organisering som uppstod redan 1996. Den kommer jag att berätta mer om på kongressen.

Stella Lindblom

## Aliĝo al la kongreso nun eblas!

**E**kde nun la Butiko estas malferma. Ĉiuj membroj de EsperantoSverige povas facile aliĝi al la Sveda Esperanto-kongreso 2014 per ĝi. Vi devas ensaluti por povi plenumi la mendon.

La unua periodo finas la 31:an de januaro. La kongresa kotizo kaj tuta kosto altiĝas per cent kronoj ekde la 1:an de februaro, do urĝas se vi volas aliĝi kiom eble plej malmultkoste. Ne forgesu ke la pago devas alveni al ni ene de la koncerna periodo por valida aliĝo!

Sub la menuo *SvEspKon* vi povas legi pri la kongreso, kiel aliĝi kaj aliaj informoj. Ene de kelkaj tagoj la informoj ankaŭ venos svedlingve.

Pro teknikaj kialoj momente nur membroj povas uzi la Butikon. Ni urĝas al ontaj kongresanoj kiuj jam ne membras en EsperantoSverige fariĝi membro. Eblas telefoni al Anita aŭ Stella, sed ni petas vian helpon: se vi havas amikon kiu volas kongresi sed tamen ne volas membriĝi ĉe la retejo, vi

povas helpi per mendo ankaŭ por tiu. Grave! Faru du malsamajn mendojn kaj ŝanĝu vian Frajtan adreson al tiu de via amiko en la mendo por via amiko.

Vi povas demandi kaj diskuti pri tio en la Diskutejo! (Ensalutu kaj alklaku *Diskutejo* sub la menuo *Aktiv* por veni tien.)

Stella Lindblom  
 (“Elfino” kaj estrarano pri komputaĵoj)

Membroletero  
(de Gotenburgo)

## Besök på Schillerska

**P**å Bokmässan i september tog läraren Birgitta Fasth kontakt med oss i vår monter och ville ha ett besök till Schillerska gymnasiet för information om esperanto.

Den 22 november var Alexander Rundberg, ny medlem i klubben, nybliven esperantist och själv fortfarande studerande, där och informerade i en årskurs 2 klass.

Jag var också med som "gam-mal" esperantist. Ungdomarna lyssnade uppmärksamt och ställde en del frågor. Kanske kan det bli någon mer gång i en annan klass.

*Helfrid Karlsson*

Ekspreso  
(de Stokholmo)

## Språkduschen succé – på nytt i april

Söndagen den 13 april kl. 11 – 17

**S**pråkduschen vi anordnade den 8 december var en framgång. Vi vill därför anordna ett liknande arrangemang under våren

De ansvariga – Tatu och Ingvar – tar gärna emot förslag

Kelklinie pri ...  
(de Norrköping)

## Esperanto i roman

**J**ag har nyligen läst en charmig roman av Fredrik Backman. Den heter: *Min mormor hälsar och säger förlåt*. Där förekommer ett sagoland, där olika riken heter följande:

miamas  
nibatalos  
miploris  
mirevas  
mimovas  
Mipardonos

Jag blev verkligen paff, när jag kom på att det ju är ord på esperanto.

Hälsningar

*Ingrid Johansson*

## Gertrud Lund lyckades med sin KER-examen

**S**om ni kanske såg i förra numret var Gertrud Lund med på fotot på de som genomgått KER-examination i Malmö. Tyvärr föll hennes namn bort vid bildtexten vid sättningen, för vilket vi ber mycket om ursäkt.

La Espero kontaktade Gertrud och fick lite mer information om hennes tankar om examinationen. Diplomet har inte fått någon inramad plats och det tycks inte heller vara det viktigaste. Snarare känns det tillfredsställande att ha klarat av examinationen, för det var länge sedan hon suttit på en regelrätt skolbänk och haft prov. Eller som hon själv uttrycker det:

– Sedan kändes det ju också bra att efter många år våga ställa upp i en examen. Jag tror, att många fler skulle kunna avlägga ett prov i esperanto. Det är inte så farligt som det låter, hälsar Gertrud.

Gertrud använder sig ofta av Esperanto då hon har många kontakter i utlandet, korresponderar med dem, tar emot esperantobesökare och samtalar i klubben. Trots det kändes det lite pirrigt och hon förberedde sig lite extra genom att läsa böcker och tillsammans med dottern Agneta arbeta igenom boken ESPERANTO



DE NIVELO AL NIVELO. Med hjälp av den kunde de uppskatta nivån på proven. Gertrud anmälde sig till och genomförde B2-nivån.

Uppmuntrad av samtalet vill redaktionen på LE uppmana fler att ta vara på de tillfällen som öppnar sig och anmäla sig till någon KER examen. Därigenom hjälper ni också till att förbättra statistiken och får samtidigt nyttig uppförskning och ett mått på den egna kunskapen.

/red

Finns det intresse att delta i 3-a Tutmonda KER-ekzameno i Malmö 17/5 2014? Om minst 5 intresserade vill genomföra examen skulle vi kunna ordna detta i Malmö. Skriv eller meddela så snart som möjligt till [sten@agado.net](mailto:sten@agado.net) eftersom det hela behöver förberedas i god tid.

Sten Svenonius

## Norrköpings Esperantoklubbs julfest.

**L**a kristnaskan feston de la Esperantoklubo de Norrköping nia L L Zamenhof honorigis per sia ĉeesto, jen dum subskribo de salutkartoj al la esperantistoj en Tampere kaj Trondheim, ĝemelurboj de Norrköping.

Zamenhofis Nils Pettersson, fotis Haldo Vedin.

(Vi i klubben tyckte att porträttligheten var slående)

*Haldo Vedin*





## Esperantoliv och framtidstankar – vårträff före kongressen

**F**rån fredagen den 25 april är alla välkomna till Esperanto-Gården för att umgås, före kongressen.

Tema: Hur kan E-G utvecklas för turism, kurser och andra aktiviteter, inte bara för esperanto-organisationer utan även för andra föreningar och personer.

En presentation i skisser och ev. modellbygge kommer att finnas tillgänglig från fredag och ligga till grund för en 3 timmars diskussion om byggnader och trädgård. Diskussion lördagen den 25 april kl. 09.00.

ABF-projekt, 4-timmar per dag, 25 -30 april – Skriv och berätta. Kanske kan vi skapa ett litet häfte, som är tvåspråkigt esperanto och svenska med exempelvis titeln: "Guldkorn från

mitt liv som esperantist". Svenska esperantister berättar om intressanta, dramatiska och humoristiska händelser ur sitt liv i esperantovärlden.

Du får gärna skriva ner din berättelse före vårträffen. Vi kan då kopiera och dela ut den till de närvarande! Du väljer vilket språk du vill använda – esperanto eller svenska.

Den 30 april har man stor fest på Folkets hus med vårelsd med efterföljande pubafton med musik av någon känd orkester på kvällen. – Kanske kan esperantomusiken få fungera som pausmusik om musikanterna kommer till Lesjöfors?

Och den 1 maj, samma dag som kongressprogrammet börjar, blir det demonstration i Filipstad

på eftermiddagen. Kanske kan jag ordna med så att någon av oss kan hålla ett brandtal för "Esperanto - framtidens EU språk"!

I ca tre timmar efter lunch kommer deltagarna att utföra diverse småjobb i anläggningen både ute och inne samt kollektiv matlagning för dem som kan – de andra äter.

För logi och mat ger du en gåva till E-G, 150 kronor eller mer per dygn.

Info även på [esperantogarden.se](http://esperantogarden.se)

Anmäl ditt deltagande direkt till [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se) eller telefon 070 767 54 55.

*Lennart Svensson*

## Esperanto-Gården tar emot gäster och idéer

**E**fter Esperanto-Gårdens årsstämma den 12 oktober 2013 fortsätter styrelsen i följande sammansättning: Ordförande Anna Ritamäki-Sjöstrand, viceordförande Lennart Svensson, sekreterare Tomas Jansson, kassör Anders Rylander och Jan Svensson, suppleanter Douglas Draper och som ny Hans-Olof Skoog som är granne med gården i Lesjöfors.

I samband med stämman ordnade vi program med Josep Franquesa i Solé från Katalonien och Sandor Hideg från Ungern. Ett 20-tal deltagare diskuterade handel på esperanto i allmänhet och marknadsföringen av Esperanto-Gården i synnerhet. Vi jämförde med andra esperantohus runt om i världen och kunde konstatera många likheter och skillnader. Exempelvis är Esperanto-Gården öppet året runt för betalande gäster, så är ni aktiva i någon förening som behöver en kurslokal eller

känner någon som behöver övernattning i Värmland, kom ihåg oss!

Vi är glada över att Svenska Esperantoförbundet förlagt årets kongress till Esperanto-Gården och esperantofamiljernas träff REF kommer till Lesjöfors i år igen den 1-10 augusti 2014. Sommarkursdatumen är 13-20 juli.

Dessutom lyckas vi antagligen inom februari anställa en kunnig esperantist med utvecklingsstöd och anordnarbidrag från Kulturarvslyftet. Mer om det när arbetet kommit igång. Esperanto-Gården kan också vara ett alternativ för dig som är i den situationen att det kan bli aktuellt med Fas 3-sysselsättning i samarbete med Arbetsförmedlingen.

*Anna Ritamäki-Sjöstrand,*  
ordförande

## Sommarkurser på Esperanto-Gården 13-20 juli 2014

Esperanto-Gården i Lesjöfors i Värmland bjuder till sommarkurs söndag-söndag 13-20 juli 2014:

- \* Esperantokurs för barn.
- \* Nybörjarkurs.
- \* Fortsättningskurs.
- \* Konversation, stil och grammatik.

Icke-rabatterat pris för hela kursen (inklusive flerbäddsrum och mat): 2 720 kronor. Billigare för studerande, pensionärer, arbetslösa, ungdomar och barn (0-4-åringar gratis). Anmälan före den 1 juni ger 500 kronor rabatt. Du kan även höra dig för om stipendier. Intresseanmälan före den 31 mars ger 10 procent

rabatt på utvalda böcker som finns att köpa under kursen.

Intresseanmälan till: [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se), tel. 0590-309 09. Har du ett programförslag kontakta oss, gärna per e-post. Mera info på [www.esperantogarden.se](http://www.esperantogarden.se). Kursansvarig: Anna Ritamäki-Sjöstrand, ordförande

### Kallelser till årsmöten

#### Förlagsföreningen

Esperanto u.p.a. kallar till årsmöte i samband med Svenska Esperantokongressen i Lesjöfors,

Styrelsen

I LEI-se kallar till årsmöte i samband med Svenska Esperantokongressen. Lördagen 3/5, kl 09.30

Styrelsen ILEI-se

#### Svenska Esperantoförbundet

kallar till årsmöte i samband med Svenska Esperantokongressen i Lesjöfors. Lördagen 3/5, kl 13.30

Styrelsen

Sveda sekcio de KELI kallar till årsmöte under Svenska Esperantokongressen i Lesjöfors, lördagen 3/5

Styrelsen

(Reservation för felaktigt tidsangivelse)

#### Someraj kursoj en Esperanto-Gastigejo 13-20 julio 2014

Informojn pri la tradiciaj multnivelaĵ someraj esperantokursoj vi trovos en [esperantogarden.se](http://esperantogarden.se).

Skribu al: [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se) por peti informojn antaŭ la 31a de marto kaj ni donos al vi rabaton en nia librovendejo dum la kurso.

## La kareso

Verŝajne multaj legantoj jam konas Julia Sigmond. Ŝi gajnis diversajn premiojn en Belartaj Konkursoj, ŝi redaktis dum multaj jaroj la gazeton BAZARO kaj ŝi ankaŭ verkis librojn, inter alie DIALOGO. Ŝi regule verkas artikoletojn al la gazeto DIA REGNO kaj mi kaptas la eblecon prezenti kelkaj el tiuj artikoletoj ankaŭ al la legantoj de LA ESPERO. /Redaktoro



**L**a infanetoj ricevas multajn karesojn. Kaj la patrinoj kaj aliuloj karesas ilin. Eblas alkutimiĝi kaj ekami la karesantan manon.

Poste ankaŭ ili karesas, unue la patrino, poste ankaŭ aliulojn. Ili eklernas karesi.

Kiel belega estas tiu ĉi vorto! Kaj kiel mirinda estas la sento, kiam nin, plenkreskulojn iu ekkaresas. Ni sentas la varmon fluantan polmon kaj tiun neniam enuigan amon, kiun konstante ni bezonas. Kaj ni sentas la forton de la kontraŭ ni radianta energio.

Tute alian vivon havas tiu homo, kiu ricevis multajn brakumojn kaj karesojn en sia infanaĝo.

Male, kiel tristiga estas la sorto de tiuj sennombraj malfeliĉuloj, kiuj spertis la batojn. Anstataŭ kareso la frapon.

Poste oni miradas, ke la infanoj konstante interbatalas. Oni eĉ ne pensas, ke ni, la plenkreskuloj kulpas pro tio. Ĉar ni ne karesis sufiĉe multe la infanojn. Pri tio eĉ ne parolante, ke ni permesas al ili rigardi la televidon, por ke ili ĉiutage "lernu": anstataŭ karesi, oni devas

frapi.

Por la solece vivantaj gemaljunuloj mankas multaj aferoj. Ne nur la mono, sed ankaŭ la bonaj vortoj. Oni ne povas imagi, kion signifas por ili ricevi ĉirkaŭbrakon aŭ kareseton.

Ne nur okaze de naskiĝtago ni donu donacon!

Ankaŭ la labortagojn eblas transformi al festotagoj, per simpla donackareso.

Ni portu nian koron en nia polmo!

*Julia Sigmond*

## Till minne

**B**örje Andersson avled den 8. dec. ett par veckor före sin 89-årsdag. Han var en av klubbens äldsta och trognaste medlemmar, alltid debattglad med ett stänk av humor. Hans kunskap om världshändelser och historia var gedigna, hans minne perfekt kombinerat med ett högt intellekt.

Till professionen var Börje journalist och skrev under pseudonymen "Texto", vilket också var gängse tilltalsform inom klubben. Under lång tid var han klubbens sekreterare och har under många år varit SEF:s kassör. För Esperantoklubben var han en av de verkliga stöttepelarna. Till sista dagen av sitt liv var han aktiv och alert

trots synproblem och begränsad rörelseförmåga.

Börje behärskade verkligen Esperanto men hade också gedigna kunskaper i tyska. Han var stamgäst på biblioteket och läste utöver tidningar en mängd tidskrifter bl. a. Der Spiegel.

Hans intressessfär var imponerande stor. Förutom språk var han t.ex. intresserad av idrott, vinterbad, schack och olika kulturer. Tidigare och senare än alla andra under året gick han i kortbyxor.

Nära Skövde ligger Simsjön, där han ägde en sommarstuga. Där fanns också kanoten redo att föra honom till bekanta runt sjön. Detta var hans Paradis! En enda sommar lämnade han

denna idyll för en esperantokonferens i Abaliget, Ungern. Första dagen träffade han Charlotte. Kärlek, kärlek... De gifte sig och hon flyttade in på Ingegatan. Esperanto blev deras hemspråk. Vid denna tid försvarade han Esperanto i Sv. Radions språkprogram.

Ända till slutet var Börje besatt av nyfikenhet och framtidsstro. Han hade alltid synpunkter på olika företeelser vid våra sammankomster. Dessutom utrustad med ett gott humör. Skövde Esperantoklubb har förlorat en stor personlighet.

*Gunnar Olsson*

## Julovojaĝo al Prago 2013

**K**araj geamikoj! Mi ĵus venis hejmen de tre bela kaj interesa antaŭjulo-vojaĝo, ĉar dum la veraj Kristnaskaj tagoj mi sidos hejme sola kun miaj libroj. Tial mi ŝatas jam nun festi. Mi vojaĝis kune kun finna amikino, kun kiu mi jam antaŭe faris interesajn vojaĝojn. Ni decidis nun vojaĝi al loko tre fama pro kristnaskaj ornamaĵoj, por travivi agrablajn sentojn de Kristnasko. Mi trovis ofertan pri vojaĝo al Prago, kiu ja famas i.a. pro bonaj julo-dekoracioj.

Ĝia famo ne troiĝis. La urbo akceptis nin per malfermitaj brakoj – la urbo, kiu estas ne nur unu, sed kvin diversaj urboj, urbo, kiu montras sin en diversaj vestoj rilate al diversaj periodoj. Ĝia historio komenciĝis jam antaŭ pli ol 2000 jaroj, kiam unuaj spuroj de “urbo” kreiĝis ĉe vadejo, kie la rivero Vltava ne estis tro profunda. Tiam keltaj triboj tie setladis. 400-500 jaroj p.K slavaj triboj venis aranĝi siajn setladojn sur la montoj ĉirkaŭ la vadejo, ĉar tie ili bone povis sin defendi. Laŭ malnovaj rakontoj kaj legendoj la princino Libus’a, gvidantino por slava matrilarka tribo decidis ke la farmisto Premysl estu ŝia edzo. Ŝi petis lin trovi vilaĝon surstrande de rivero Vltava, kaj ke li kreu urbon tie. Laŭ ŝia antaŭdiro en tiu urbo okazos grandiozaj eventoj. Tiu urbo fariĝos Prago, la ora urbo. La grekaj misiistoj Kyrillos ka Methodos kristanigis la slavajn tribojn en la 900-a jc. Li baptis i.a. la princinon Ludmila, kiu ankoraŭ estas la sanktulino de Bohemio. Ŝia nepo Wenzel (Vaclav) estis tre religiema, sed estis murdita survoje al meso. Jam fine de la 10-a jc juda komercisto Ibrahim ibn Jacob admire skribis pri Prago: “Ĝi estas vigla komerca urbo kun multaj ŝtonaj domoj”. En sama periodo estis konstruita monaĥejo de Sankta Georgo sur la Kastela monto.

Nia promenado komenciĝis en la Kastela aŭ Fortikaĵa urbo (unu el la kvin urboj). De tie oni havas vastan superrigardon super la pli malaltaj urboj. De sube oni vidas la imponan kastelon kaj la preĝejon Sankta Veit, kies altaj turoj fariĝis

rekoniloj de la urbo Prago. Prago ankaŭ portas la epiteton, urbo de cent turpintoj, la magia urbo, la ora Prago. Ĉiuj vortoj bone priskribas la urbon – la urbo, kiu en si kapablas mikse konservi Mezepokon, Renesancon, Barokon kaj la pli moderna Jugend-periodon (Art Nouveau). Plurloke la placoj kaj la mallarĝaj, serpentumantaj stratoj estas pentritaj laŭ tiu nova arto. La preĝejoj kaj kupoloj estas dekoraciitaj per oro, la muroj portas pentraĵojn kaj reliefojn de diversaj epokoj. Prago donas malavare de sia unikeco, de sia diverseco, de sia etoso, ke kelkmomente niaj cerboj apenaŭ povas ĉion digesti.

Krom ĉiuj historiaj memoraĵoj, nun dum la jula periodo ĉiuj stratoj kaj placoj lumas de kandelaĵoj festonoj, kiuj envolvas ĉiujn arbojn. Grandaj, larĝaj kristnaskaj abioj plenigas la placojn. Kandeloj okulumas, grandaj kugloj kaj steloj multkolorigas la urbon. En multaj anguloj inter la domoj, surstrate, sur la multnombraj placoj unuopuloj aŭ etaj grupoj ludas klasikan aŭ modernan muzikon. La urbo vibras de arto, muziko, historio. Tre bonŝance la kruela dua mondmilito ne detruis kaj bombis la urbon. Sed dum alia granda milito “La tridekjara milito” i.a. sved-finaj soldatoj sufiĉe multe rabis valoraĵojn de la Ora Urbo. Dum tiu periodo Svedio provis krei al si imponan grandregnon. Certe kiam la homoj de la malriĉa Nordio vidis tiom da valoraĵoj, ili sentis emon riĉigi kaj plibeligi siajn kastelojn, preĝejojn kaj landon.

La Veits-katedralo servas kiel tombo-katedralo por famaj ĉeĥoj dum jarcentoj; reĝoj, artistoj, sciencistoj. Super la suda enirejo de la katedralo la fama mozaiko “La fina juĝo” ŝtelas de ni la spiron. La artaĵo devenas de la jaro 1370 kaj estas kreita de oro kaj ŝtonoj diversspecaj kaj montras Virgulinon Marian, Johanon la Baptiston kaj ses sanktulojn de Bohemio. Ne eblas eĉ parteton priskribi de grandiozeco de la impona kaj grava gotika katedralo, kiu en si entenas elstaran arton de Mezepoko ĝis Art nouveau, la lasta en fenestraĵoj de Alfons Mucha.

Ni flaris odoron de “ĉiuj kvin urboj” el kiuj ekzistas Prago. Ni vidis la barokpreĝejon Loreto, kun nekredibla riĉeco – eble la plej valora aĵo estas la monstranso de la jaro 1699 dekorita per oro kaj noblaj ŝtonoj. Apude situas Strahov-monaĥejo, en kiu vivis de la jaro 1140 ĝis la jaro 1952 premonstraten-monaĥoj. Ilia ordeno okupiĝas pri studado de filozofio kaj religio. La biblioteko, kiun oni povas vidi enhavas 130 000 volumojn, 3 000 manuskriptojn kaj 2 000 unuaj eldonoj de libroj, ekz de Nicolaus Copernicus: “De Revolutionibus Orbium Caelestium”, en kiu li priskribas, ke la tero ĉirkaŭas la sunon.

Ĉe la Granda Placo de Malnova Urbo ni eĉ kelkfoje admiris la astronomian horloĝon de la jaro 1490 kun la diĉploj, kiuj ĉirkaŭpromenas la turon. De kafumado kun bongusta kuko en Mozart-kafejo ni vidis la spektaklon de la astromomia horloĝo. Apude situas la fama domo renesanca “La Domo je la minuto” kun karakterizaj sgraffito-pentraĵoj. Je ĉiu paŝo oni renkontas famaĵojn, vivindaĵojn. Ni sekvis Karlo-straton al la fama Karlo-ponto, 520 metrojn longa. La nuna ponto estis konstruita meze de la 14-a jc kaj staras ĝis ankoraŭ 600 jaroj poste. En multegaj montrofenestroj ni povis ĝui la aspekton de la bohemia kristalo kun diversaj facetoj kaj eĉ kun diversaj koloroj.

La riĉeco kaj fameco de Prago devenas de ĝia perfekta situo inter rivero kaj vojoj inter sudo kaj nordo inter okcidento kaj oriento. Multo renkontiĝas en Prago, multo da homoj, multo da varoj, multo da mono! Renkontiĝis esperantistoj el nordo (Finnlando, Svedio), el oriento (Kazakio) kaj el la centro (Prago). Fariĝis tre gaja kaj interesa posttagmezo en restoracio de fervojistoj. Etaj modeloj de trajnoj vojaĝis sur la tabloj kaj etaj transport-vagonoj alportis bieron al la manĝantoj. Ni ĉiuj estas geamikoj, ĉar en Esperantio ja funkcias ke “viaj geamikoj estas miaj geamikoj”. Dankon al karaj ĉeĥaj geamikoj, ke ili havis tempon kaj eblecon renkonti nin kaj eĉ pli beligi nian restadon en Prago.

Kripoj neprajn dum Kristnaska tempo ni vidis en la Bethlema kapelo. Ili abundis diversaspektaj, el plej diversaj materialoj faritaj, de plej diversspecaj artistoj. Montriĝis ankaŭ figuroj el ĉeĥaj legendoj kaj fabeloj. En alia flanko de la kapelo estis tre detala kaj interesa ekspozicio pri Jan Huss, la fama reformisto de la katolika eklezio en Ĉeĥio, 100 jarojn antaŭ Martin Luther en Germanio. Oni vidis spurojn pri kiel Prago kaj Bohemio dum la historio laboris por reliefigi siajn proprajn trajtojn en la grandregno de Habsburgo.

Ni vizitis "La Teatron de la Parlamentanoj", kie Mozart laboris dum li loĝis en Prago. La opero "Don Giovanni" havis premieron tie la 29-an de oktobro 1787. Mozart mem direktis la orkestron. Estis granda sukceso. Maljuna viro, kiu rakontis pri la teatro kaj pri kiam Mozart laboris tie, vere fervore kaj vive rakontis pri tiamaj eventoj. Violonkvarteto ludis plurajn muzikpartojn el kreaĵoj de Mozart. Aŭskulti tion en la "teatro de Mozart" estis granda travivaĵo. Ofte ni povis gustumi kulturon, kiu disiĝis el Ĉeĥio en la mondon, sidante en la kadroj, kie ĝi naskiĝis.

Nia hotelo situas proksime al "Stata Operejo", kie ni unuan vesperon spektis la operon "Tosca" de Giacomo Puccini. Sidi en la belega salonego, dekoraciita per oro kun pentraĵoj entegmente kaj ĉirkaŭita de nekalkuleblaj nombroj de loĝioj kovritaj per oro donis al mi senton esti portita al malnovaj tempoj. La arioj temas pri arda amo kaj kruela ĵaluzo. Mi ĝuis la konatajn ariojn, kiuj gvidis la sentojn de plej mola amo al forta malamo kaj krueleco. La sceno montris periodon de tempo 1800 en Italio. Multaj el ni kontentis, ke la sceno estis kreita malnovmodele kaj ne kiel ofte en svedaj teatroj modern-aspekte. Oni kantis itallingve kaj la teksto de la arioj kaj kantoj aperis anglalingve. Vespero de plena ĝuo!

Alian vesperon kvarteto violinludis en eta, malnova preĝejo konatajn melodiojn kun konekto al advento kaj kristnasko. En la voja-

ĝa programo ĉiun tagon prezentis muziko. Montriĝis ĉie ajn multe da reklamo pri koncertoj, ofte pluraj ĉiutage. Vere muziko-plena urbo! Ofte dum la promenadoj en Prago ni renkontis verkojn kaj muzeojn de Alfons Mucha, la granda artisto de Art nouveau. Li multon laboris en Parizo dum la komenco de la 20-a jc. Li multe laboris kun Sara Bernhardt kaj kreis "afiŝojn" por ŝiaj diversaj prezentadoj. Kiam li revenis al Ĉeĥio li pentris multajn bildojn pri ĉeĥaj legendoj kaj rakontoj "Slavaj epopeoj", en stilo, kiu multe malsimilas de liaj pli konataj "afiŝoj". Per ambaŭ siaj pentrostiloj li fariĝis tre konata en la mondo.

Josefov, la juda urbo, ankoraŭ unu el la kvin urboj de Prago. En Prago situas la plej aktiva kaj grava el la judaj socioj de Eŭropo. Ankoraŭ situas tie ortodoksa kongregacio. Jam en la 11-a jc almigris judoj kaj kreis sian socion ĉe Vltava-rivero. Dum longa periodo la judoj ludis gravan rolon socie kaj ekonomie ekz dum la 13-a jc kaj 16-a jc. De tempo al tempo dum la jarcentoj okazis kruelaj pogromoj. En la jaroj 1541 kaj 1744 la judoj estis eligitaj el la lando, sed okazis ke tio malplibonigis la ekonomian sistemon, tiel ke necesis denove permesi al la judoj ekloĝi en Prago. En la jaro 1680 okazis forta epidemio de pesto. Multaj mortis kaj oni devis aranĝi grandan tombejon inter la sinagogoj. Plurfoje okazis incendioj inter la lignaj domoj. Regule okazis inundoj en la urbo. La judoj devis loĝi en getoj, kvankam ankaŭ eblis asimiliĝi kun ĉeĥaj kaj germanaj najbaroj. La ĉeĥa kaj germana lingvoj estis parolataj kaj verŝajne ankaŭ la jida lingvo. Dum la 19-a jc kreskis la nombro de enloĝantoj en la geto, ekestis sanigaj kaj higienaj katastrofoj. Oni malkonstruis la domojn kaj novaj domoj en la stilo Art nouveau estis konstruitaj.

Mil jaroj da malnova simbiozo en Eŭropo fariĝis detruita de la naziismo. Multaj judoj provis diversvoje fuĝi el sia lando. Tiuj, kiuj ne havis rimedojn ekonomiajn por

forvojaĝi malpliigis per transportoj al koncentrejoj. Malmultaj travivis. Nun denove ekzistas unu ortodoksa grupiĝo kun iom pli ol 1000 anoj. En Pinkasova sinagogo la muroj estas plenigitaj per nomoj de ĉeĥaj judoj, kiuj pereis en "holocaust". En la juda muzeo estas kolektitaj el la tuta lando multaj memoroj kaj aĵoj de juda religio kaj vivo; kandeligoj kun loko por sep aŭ naŭ kandeloj, Tora-tekstoj, aliaj malnovaj tekstoj, manuskriptoj, kalikoj, kaj multaj aliaj sanktaĵoj arĝentaj. La unua sinagogo estis konstruita komence de la 13-a jc. Ĝi estas la plej aĝa domo de Prago kaj la sola tiel aĝa sinagogo, kiu estas konservita en Eŭropo. La Malnova juda tombejo estas eble la plej vizitata loko de turistoj. Troviĝas en ĝi 12.000 tomboj ofte unu super la alia, la plej unuaj de la jaro 1429 kaj la lasta de la jaro 1787. Poste oni kreis Novan judan tombejon. La plej konata tombo en la malnova tombejo estas tiu de Rabbi Loew, kiu okupiĝis pri supernaturaj aferoj. Multaj homoj venas viziti lian tombon. Sur multaj tomboŝtonoj oni metas ŝtonetojn por honorigi la mortinton. Eble la plej konata tombo en la Nova juda tombejo estas tiu de Franz Kafka, eble la plej konata ĉeĥa verkisto.

Ĉi tiu memoraĵo de bela antaŭjula vizito en Prago fariĝis ja tre longa, (mi esperas, ke vi havas fortojn tralegi ĝin). Tamen ĝi enhavas nur parteton de tio, kion mi vidis kaj travivis. Certe vi rimarkas, ke multo mankas. Eble vi demandas vin, kial ŝi nenion skribis pri tio aŭ pri tio ĉi. La malmultaj tagoj en Prago estis tiel riĉaj de miraklaj travivaĵoj, ke ne eblas ĉion lokigi en letero (neniu havus fortojn ĝin traplugi).

Mi esperas tamen, ke vi kaptis iom de miaj travivaĵoj en la ora urbo kun centoj da turoj kaj longa historio.

Deziras al vi Prosperan Novan Jaron 2014 kun sano kaj interesa vivo.

Via amikino

*Kerstin*

